# Amerika Esperantisto

Application pending for entry as Second Class Mail Matter

Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
*Monthly Magazine of the International Language, Esperanto*
*1239 Michigan Avenue, Chicago*

Jarabono, Ie en la Mondo, Unu Dolaro (Frankoj 5.25)
*Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar*

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ
*AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS*
Redaktoro : ARTHUR BAKER : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUMO 2 SEPTEMBRO, 1907 NUMERO 2

**Jen estas aŭtuno,** kaj kun ĝi la reveno de la infanaro al la lernejo, la restarigo de la forno en la "salono" de niaj neriĉaj edzigitaj amikoj, kaj la jara reviviĝo de Esperanto. Pri tiu lasta temo, mi petas permeson insisti ke la multe pli granda tasko por ĉiu esperantisto devas esti la propagando. Kompreneble, la unua afero estas lerni ĝin. Sed kiam mi diras "lerni" mi ne parolas pri tia grado de lerneco kia ebligas al la lerninto diskutadi senfine pri nuancigo de la vokaloj, aŭ la ebla forigo de la signo akuzativa. Tiel ankoraŭ diskutas kamparaj predikantoj pri la "rimedoj de la savado" aŭ la "kredaro." Sed al mi ŝajnas pli bone ke ni donu al niaj horoj certan valoron ol ke ni malŝpare elspezu orajn tagojn en diskutado aŭ kritikado de tre dubebla valoro. Unu samideano, skribante ke li estas preta por fari ion eblan por Esperanto, aldonas "Esperanto devos pagi min por ĉio kion mi faros." Dum mi ne povas, tre bedaŭrinde, certigi la kolegon pri la realiĝo de lia ora (aŭ eble modeste arĝenta) sonĝo, mi aprobas lian sintenadon; kaj la pli rapide diletantaj amatoroj fariĝas serĉantoj de la matena steko kaj vespera supo per Esperanto, la pli frue nia laboro portos frukton. Ludadi je Esperanto estas tre bone, sed laboradi je ĝi estas plej bone.

## LA TRIA KONGRESO

Dum la tempo de tiu ĉi skribado la Tria Kongreso Esperantista sidadas en Cambridge, Anglujo. Pli korekte, ĝi saltadas, kuradas, kantadas kaj huraas. Tiaj faroj sendube malpacigas multajn seriozajn kaj indegajn anglojn, kiuj ne povas kompreni kial persono de plena kresko povas tiel konduti. Esperantistoj estas granda aro da feliĉemuloj—ĉu ne tion signifas ilia nomo? En koroj kredante al la parenceco de la tuta homa raso, kiam la familio, dum centjaroj disigite, ree unuiĝas, ili tre dece kaj entuziasme ĝojas.

En tiu ĝojo la neesperantistaj mondanoj ne povas partopreni. Nature, ili ĝin ne komprenas, kaj pensas ke Esperanto estas speco de sorĉaĵo, kiu allogas al si speciale tiujn kompatindulojn kiuj havas en la kapoj ĉambrojn por lui. Silento; rideto; ridego; seriozaj kontraŭfaroj; argumento; batalo; venko. Tia estas la historio de ia movado por la plibono de la homaro. Tiel estas je malsana infano; spite liaj baraktoj kaj kriegoj oni alpuŝas al li la kuracilon en la gorĝon; se li resanigas kaj akiras komprenemon, li al oni dankos. Tiaj ni ĉiuj estas.

Tion komprenante, ni ne atencas doni raporton pri la kongreso ĝis la alveno de sciigoj de esperantistoj. Nuntempe, la mondo ankoraŭ ne forlasas la periodon de ridetoj, kaj la ĉiutagaj ĵurnaloj ricevas telegrafe de Eŭropo nur malgravajn kritikojn pri la kongreso. Sed tio estas granda plibonigo. Pri Boulogne ili nenion diris; pri Geneva, nur malmulte; sed pri Cambridge la *New York Herald* enpresis duonkolonon, dirante ke esperantistoj estas ĉiuj unuideaj socialistoj. Ni do kuraĝiĝu; en 1908 ili eble enpresos realan novaĵon pri nia afero.

# KONSTITUCIO DE LA UNUIGITAJ ŜTATOJ

Tradukis G. W. Lee, ano de Bostona Societo Esperantista.

## ARTIKOLO I

(Daŭrigo)

*Fako 8*

La kongreso devas havi potencon meti kaj kolekti taksojn, impostojn, enportpagojn, kaj akcizojn, pagi la ŝuldojn kaj provizi pro la komuna defendado kaj ĝenerala bonstato de la Unuigitaj Ŝtatoj; sed ĉiuj impostoj, enportpagoj kaj akcizoj devas esti egalaj tra la Unuigitaj Ŝtatoj; prunte preni monon per la kredito de la Unuigitaj Ŝtatoj; reguligi komercon kun fremdaj nacioj kaj inter la apartaj ŝtatoj kaj kun la indianaj gentoj; fondi unuforman reglon pri enlandiĝo, kaj unuformajn leĝojn pri la temo de bankrotoj tra la Unuigitaj Ŝtatoj; fabriki monon, reguligi ĝian valoron kaj de fremda monaro, kaj fiksi modelon de peziloj kaj mezuriloj; provizi por la punado de tiuj kiuj imitas garantiaĵojn kaj estantan monaron de la Unuigitaj Ŝtatoj; fondi poŝtajn oficejojn kaj poŝtajn vojojn; antaŭenigi progreson de scienco kaj utilaj artoj, per garantio dum limigitaj tempoj al verkistoj kaj elpensistoj ekskluzivan rajton al iliaj propraj skribaĵoj kaj eltrovaĵoj; fondi juĝejojn malsuperajn al la ĉefa juĝejo; difini kaj puni marrabadojn kaj krimadojn faritajn sur la ekstermaroj, kaj ofendojn kontraŭ la leĝo de nacioj; anonci militadon, doni leterojn de *marque* kaj revenĝo, kaj fari regularojn pri prenoj sur tero kaj maro; starigi kaj subteni militistarojn, sed neniu voĉdono de mono por tiu uzado devas esti por pli longa tempo ol du jaroj; provizi kaj subteni ŝiparon; fari regularon pri la registaro kaj regulon pri teraj kaj ŝipaj defendiloj; provizi pri la kunvoko de la militantaro por igi la leĝojn de la Unuigo obeataj, subpremi ribelojn kaj repuŝi ekokupadojn; provizi por organizi, armi kaj disciplini militantaron kaj por reguli tiajn porciojn de ĝi kiaj povas esti uzotaj je servo de la Unuigitaj Ŝtatoj, rezervante al ĉiu ŝtato la elekton de ĝiaj oficiroj kaj aŭtoritaton instrui militantaron laŭ disciplino ordonita de Kongreso; ekzerci ekskluzivan leĝdonadon en ĉiuj ajn procesoj, super tiu distrikto (ne pli ol dek mejloj je kvadrato) kiu povas, per cedo de apartaj ŝtatoj, kaj

akcepto de kongreso, fariĝi sidejo de registaro de la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj ekzerci similan aŭtoritaton super ĉiuj lokoj aĉetitaj per la konsento de la leĝfarantaro de ŝtato en kiu la samo estos, por la konstruigo de fortikaĵoj, magazenoj, armilejoj, ŝipejoj, kaj aliaj necesaj konstruaĵoj; kaj fari ĉiujn leĝojn kiuj estos necesaj kaj taŭgaj por plenumi la superdiritajn povojn, kaj ĉiujn aliajn povojn lotumatajn per tiu ĉi konstitucio al la registaro de la Unuigitaj Ŝtatoj aŭ al kiu ajn fako aŭ oficisto de ĝi.

*Fako 9*

[La migrado aŭ enportado de tiaj personoj kiajn iu el ŝtatoj kiuj nun ekzistas pensos konvenaj allasi ne devas esti malpermesata antaŭ ol la jaro mil ok cent oka, sed takso aŭ imposto povas esti ordonata je tia enportado, ne pli ol dek dolaroj por ĉiu persono].[a]

La privilegio de la skribitaĵo de *habeas corpus* ne devas esti interrompata escepte kiam en okazoj de ribelado aŭ ekokupado la publika sendanĝereco tion bezonas.

Neniu leĝmovo de defekto aŭ *ex post facto*'a leĝo devas esti aprobata.

Nenia kaptakso aŭ alia rekta takso devas esti metata escepte laŭ proporcio al sumigaĵo aŭ denombraĵo kiu en tiu ĉi antaŭe estas ordonita fariĝi.

Nenia takso aŭ imposto devas esti metata je komercaĵoj eksportataj el iu ŝtato.

Nenia prefero devas esti donata per ia regulo de komerco aŭ enspezo al havenoj de unu ŝtato super tiuj de alia; kaj ŝipoj irantaj al, aŭ de, unu ŝtato, ne devas esti devigataj enveniĝi aŭ pagi limimpostojn en alia.

Nenia mono devas esti elprenata el la trezorejo, sed pro voĉdonoj faritaj laŭ leĝo; kaj regula raporto kaj kalkulo de enspezadoj kaj elspezadoj de ĉiu publika mono devas esti publikigata de tempo al tempo.

Nenia titolo de nobeleco devas esti permesata de la Unuigitaj Ŝtatoj; kaj neniu persono tenante ian oficon de profito aŭ konfido sub ili, devas akcepti, sen konsento de kongreso, ian donacon, salajron, oficon aŭ titolon de ia ajn speco, de iu reĝo, reĝido aŭ fremda ŝtato.

*Fako 10*

Neniu ŝtato devas trakti ian kontrakton, interligon, aŭ konfederacion; doni leterojn de *marque* aŭ pro revenĝo;

---

[a]Tiu ĉi frazo estis provizora.

fabriki monojn; ellasi kreditleterojn; farigi ion krom ora kaj arĝenta mono esti ekvivalento por pago pro ŝuldoj; aprobi ian leĝmovon de defekto, *ex post facto*'an leĝon, aŭ leĝon kiu difektos devigecon de kontraktoj, aŭ doni ian titolon de nobeleco.

Neniu ŝtato, sen konsento de kongreso, devas meti iajn enportadojn aŭ impostojn pro enportoj aŭ eksportoj krom tiu kiu povas esti absolute necesa por plenumi siajn ekzamenajn leĝojn; kaj produktaĵo senrabata de ĉiuj impostoj kaj enportadoj metataj de ia ŝtato pro enportoj aŭ eksportoj devas esti por uzado de trezorejo de la Unuigitaj Ŝtatoj; kaj ĉiuj tiuj leĝoj devas esti subigeblaj al korekto kaj kontrolo de kongreso.

Neniu ŝtato sen konsento de kongreso, devas meti ian imposton de enhavebleco, gardi militistarojn aŭ militŝipojn en tempo de paco, trakti ian interkonsenton aŭ kontrakton kun alia ŝtato aŭ kun fremda nacio, aŭ eniri en militeco, escepte ke ĝi efektive estas enpenetrata aŭ en tiel minaca danĝero kiel ne permesos prokrastecon.

## ARTIKOLO II

### La Prezidanto

*Fako I*

La regantara povo devas esti donata al prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. Li devas teni sian oficon dum templimo de kvar jaroj, kaj kune kun vic-prezidanto elektota por sama templimo, devas esti elektata jene:

Ĉiu ŝtato devas nomi tiel maniere kiel sia leĝfarantaro povas ordoni aron da elektantoj egalan al tuta nombro da senatanoj kaj reprezentantoj je kiu la ŝtato estas titolata en kongreso, sed neniu senatano nek reprezentanto, nek persono tenante oficon de profito aŭ konfido sub la Unuigitaj Ŝtatoj devas esti nomata elektanto. [Elektantoj devas kunveniĝi en siaj propraj ŝtatoj, kaj baloti por du personoj, el kiuj unu almenaŭ ne devas esti loĝanto de la sama ŝtato kiel ili mem. Kaj ili devas fari registron de ĉiuj personoj balotataj, kaj denombro de voĉdonoj por ĉiu; tiun registron ili devas subskribi kaj atesti, kaj transigi sigelitan al ejo de registaro de la Unuigitaj Ŝtatoj, direktitan al prezidanto de senato.

La prezidanto de senato devas, en ĉeesto de senato kaj domo de reprezentantoj, malfermi ĉiujn atestojn kaj tiam la voĉdonoj devas esti kalkulataj.

Persono kiu havas la plej grandan nombron de voĉdonoj devas esti prezidanto, se tia nombro estas plimulto de tuta nombro de elektantoj nomataj; kaj se estas pli ol unu kiu havas tian plimulton kaj havas egalan nombron da voĉdonoj, tiam domo de reprezentantoj devas elekti per voĉdono unu el ili prezidanto; kaj se neniu el ili havos plimulton, tiam el la kvin plej altaj en registro la dirita domo devas tiamaniere elekti prezidanton.

Sed en elekto de prezidanto voĉdonoj devas esti farataj po ŝtatoj, reprezentaro de ĉiu ŝtato devas havi unu voĉdonon; kvorumo por tiu celo devas konsisti el du trionoj de ŝtatoj, kaj plimulto el ĉiuj ŝtatoj devas esti necesa por elekto. En ĉiu okazo post elekto de prezidanto, persono havante la plej grandan nombron da voĉdonoj el elektantoj devas esti vicprezidanto.

Sed se restus du aŭ tri kiuj havas egalajn voĉdonojn, senato devas elekti el ili per voĉdono vicprezidanton.][a]

La kongreso povas decidi tempon por elekti elektantojn kaj tagon kiam ili donos siajn voĉdonojn; tiu ĉi tago devas esti sama tra la Unuigitaj Ŝtatoj.

Neniu escepte nature naskita regnano, aŭ regnano de la Unuigitaj Ŝtatoj kiam tiu ĉi konstitucio estis alprenita, devas esti elektebla al ofico de prezidanto; nek iu devas esti elektebla al tiu ĉi ofico kiu ne estos atinginta aĝon de tridek jaroj, kaj estinta dek kvar jarojn loĝanto en la Unuigitaj Ŝtatoj.

En okazo ke la prezidanto estos formovita el ofico, aŭ se lia morto, eksiĝo aŭ neebleco plenumi povojn kaj devojn de dirita ofico, la samaj oficoj devos reveni al la vicprezidanto kaj kongreso per leĝo devas provizi pro la transloko, morto, eksiĝo aŭ neebleco ambaŭ de prezidanto kaj vicprezidanto, anoncante kiu oficisto tiam agos kiel prezidanto, kaj tiu oficisto agos laŭe, ĝis malkapableco estos forigita aŭ prezidanto estos elektita.

Prezidanto devas, je esprimataj tempoj, ricevi pro siaj servoj kompensadon, kiu nek devas esti plimultigata nek rabatata dum periodo por kiu li estos elektita, kaj li ne ricevos en tiu periodo alian salajron de la Unuigitaj Ŝtatoj, aŭ iu el ili.

Antaŭ kiam li entreprenos devojn de sia ofico, li devas preni sekvantan ĵuron aŭ ateston: Mi solene ĵuras (aŭ

[a]La dekdua reformado estas anstataŭinta tiun ĉi parton.

atestas) ke mi fidele plenumos devojn de ofico de la prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj laŭ mia plej granda lerteco, gardos, protektos kaj defendos konstitucion de la Unuigitaj Ŝtatoj.

*Fako 2*

La prezidanto devas esti ĉefestro de la militistaro kaj de ŝiparo de la Unuigitaj Ŝtatoj ; li povas demandi opinion, skribe, de ĉefa oficisto en ĉiuj regantaj departementoj, pri ia temo kiu apartenas al devoj de iliaj propraj oficoj, kaj li devas havi potencon fari prokraston de ekzekuto kaj pardonojn pro ofendoj kontraŭ la Unuigitaj Ŝtatoj, esceptinte pri procesoj de denuncaĵo.

Li devas havi potencon, per kaj kun konsento kaj konsilo de senato, fari traktaĵojn se nur du trionoj de ĉeestantaj senatanoj konsentos ; kaj li devas nomi, kaj, per kaj kun konsilo kaj konsento de senato, elektigi ambasadorojn, aliajn publikajn ministrojn kaj konsulojn, juĝistojn de superega juĝejo, kaj ĉiujn aliajn oficistojn de la Unuigitaj Ŝtatoj, kies elektoj en tie ĉi ne estas alie provizataj kaj kiuj estos fondataj per leĝo ; sed kongreso povas per leĝo doni potencon nomi tiajn malsuperajn oficistojn kiel ili pensas konvenaj, aŭ al prezidanto sole, aŭ al juĝejoj, aŭ al ĉefoj de departementoj.

La prezidanto devas havi potencon plenigi ĉiujn malplenaĵojn kiuj povas okazi dum libertempo de senato, per permesi komisiojn kiuj ĉesos en fino de ilia sekvanta kunveno.

*Fako 3*

Li devas je tempo post tempo doni al kongreso sciigon pri la stato de la unuigo, kaj rekomendi por ilia konsidero tiajn regulojn kiel li juĝos esti necesaj kaj konvenaj ; li povas, je eksterordinaraj okazoj, kunvoki ambaŭ domojn aŭ unu el ili, kaj kiam ili malkonsentos, rilate al tempo de prokrasto, li ilin povas prokrasti al tiu tempo kiun li pensos konvena ; li devas ricevi ambasadorojn, kaj aliajn publikajn ministrojn ; li devas zorgi ke leĝoj estu fidelaj portataj en efikeco, kaj devas komisii ĉiujn oficistojn de la Unuigitaj Ŝtatoj.

*Fako 4*

La prezidanto, vic-prezidanto kaj ĉiuj civilaj oficistoj de la Unuigitaj Ŝtatoj devas esti eligitaj el ofico per denunco kaj kondamno je perfido, subaĉeto, aŭ aliaj krimegoj kaj malbonaĵoj.

(Daŭrigota)

## GRAVA ALVOKO

Sro. F. Soler Valls, Prezidanto de la Grupo Esperantista de Enquera, Valencia, Hispanujo. Al la Literfabrikistoj, Presistoj kaj Redaktoroj de Esperantistaj Gazetoj:

La fakto, ke ĉiuj presejoj ne posedas ankoraŭ la supersignitajn literojn por Esperanto, kaj ke la presistoj ne povas aĉeti tiajn literojn en kiu ajn literfabrikejo, tial ke oni ne fabrikas ilin ĝenerale, kiel la aliajn ordinarajn literojn, malebligas grandmaniere la disvastigon de nia lingvo internacia, ĉar multaj presejoj rifuzas presigi broŝurojn aŭ artikolojn propagandajn kiuj enhavas literojn kun supersignoj.

Ni bone scias la rekomendon de nia kara Majstro pri la uzado de ch, gh, jh, anstataŭ ĉ, ĝ, ĵ. Sed ni opinias, ke tiu rekomendo estas farita en la senco, ke tiun uzadon oni devas akcepti nur en okazo de ekstrema neceseco, ĉar ĝi povus naski konfuzon al lernontoj, kiel ni jam kelkafoje ĝin konstatis.

Antaŭ nelonge, la presejo de mia urbo dezirante akiri la supersignitajn literojn, ilin mendis ĉe Madrid'a literfabrikejo. Tiu ĉi tuj respondis, ke tio ne estas ebla; ke antaŭ ĉio oni devas mendi la necesajn matricojn ĉe gravuristo, kaj poste oni devas fandigi la literojn per tiuj matricoj.

Oni senpene komprenos, kiaj senutilaj elspezoj kaj perdo de tempo estas necesaj por tiele akiri la deziritajn literojn.

Estus do tre utile kaj praktike rekomendinde por la bono de nia afero, ke ĉiuj literfabrikistoj, kiuj fabrikas la diritajn literojn, anoncu ĝin kiel eble plej disvastige, kaj ebligu la aĉeton de tiaj literoj per sciigo de prezoj kaj kondiĉoj de vendado. Tiel same, la esperantistaj presejoj devas ankaŭ publikigi per ĉiuj eblaj rimedoj sciigojn pri la literfabrikejoj, kie oni povas akiri la supersignitajn literojn. Kaj fine, la esperantistaj gazetoj farus grandan servon al nia progagando, se ili en siaj kovriloj konstante anoncus samajn faciligojn pri tia punkto.

Tiel ili ne nur faciligos la akiron de la specialaj literoj al presistoj ilin dezirantaj, sed ankaŭ altiros la atenton kaj eĉ la deziron de multaj aliaj, kiuj, ne pensante antaŭe pri tio, eble tiam volos fari tiun akiron, des pli kiam nia lingvo en kreskanta maniero estas disvastigita en la mondo.

Helpu, do, karaj samideanoj! Kaj oni dankos ĉiujn, kiuj ne malŝatos mian humilan alvokon, aŭ prezentos alian

pli bonan rimedon por malaperigi la nunekzistantajn antaŭditajn malfacilaĵojn.

---

Pri la antaŭa demando, ni deziras rememorigu al niaj legantoj ke la granda plimulto da gravaj ĵurnaloj uzas la maŝinon de la Mergenthaler Linotype Company, Nov-Jorko, kiu jam de longe vendas la matricojn por Esperanto, en la grandecoj 6, 7, 8 kaj 10. En la scio de tiu ĉi ĵurnalo, estas en la Unuigitaj Ŝtatoj nur sep specoj da literoj, en tri grandecoj, por la mankompostado de Esperanto. El ili unu apartenas al *Christian Endeavor World*, alia al Sroj. Ellis & Co., Oak Park, Ill., kaj kvin al Amerika Esperantisto. Tamen, per la klopodoj de nia redaktoro, la sekvantaj firmoj promesis fabriki kaj liveri je ordinaraj prezoj la literojn supersignitajn se la mendanto aĉetas sufiĉan kvanton da aliaj literoj samtempe: Barnhart Bros. & Spindler, Chicago; American Type Founders Co., Chicago; Lanston Monotype Company, New York.

Tamen, ĉar la granda plimulto da lokaj ĵurnaloj kaj komercaj presejoj nek posedas la Mergenthaler' nek ofte mendas novajn literojn, ni konsilas al *ĉiu esperantisto* ke li mem posedu areton da literoj, kiun li povas aŭ donaci aŭ prunte doni al sia presisto; por tiu celo ni kalkulas la supersignitajn literojn en du plenaj paĝoj de tiu ĉi gazeto—paĝoj 10 kaj 11, aŭgusta numero: ĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĉĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝĝ ĵĵĵĵĵĵĵĵĵĵĵŝŝŝŝŝŝŝŝŝŝŝŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭŭĈĈ *por la* h *kaj grandaj literoj,* J H *ni uzas* apartapeca signo, ^. *Ni tial aldonas* ^ ^ ^ĈĈŜŜŜĜĜĜ.

Tiun ĉi tutan areton da literoj ni sendos afrankite al iu mendanto por 40 cendoj. Komprenehle la prezo estas pli por la laboro de aranĝo kaj sendo ol por la literoj mem, kvankam estas fakto, ke kelke da tiu ĉi plumbaĵo nin malpezigis po kvin dolaroj por ĉiu funto. Sed ne kompatu nin; paginte por la matricoj, Sroj. Ellis trovis ke por sia ĉĝĵŝŭ ili adiaŭis al du dolaroj por ĉiu unco! Kaj la senhontaj literoj oni ne fabrikas el korko, sed el kupro, nikelo kaj plumbo—plimulte plumbo.

## ONI HEJTADU LA FORNEGON!

*Al la Samideanaro:* Je la oka tago de Septembro, 1906, aperis la unua numero da nia revueto. De tiu tempo ĝi trapasis kelkajn malfacilaĵojn kaj renkontos aliajn. En la jaro pasinta mi elspezis por ĝi mian tutan propran posed-

aĵon kaj severe streĉis mian vidpovon. Sed la rekompenco estas sufiĉa—ĝi vivas, kaj dum mi mem povas vivi kaj vidi, ĝi vivos. Estas esperate, ke ĝi baldaŭ pligrandiĝos. De neniu krom mi mem ĝi estas ricevinta unu cendon donace, kaj tion ne faros. Kiel parto de nia propra propagando ni estas disdonintaj 20,000 esperantajn libretojn, kaj tiun laboron ankoraŭ daŭradas, sendinte dum la lasta semajno 1,000 libretojn al ĵurnalaj redaktoroj.

Tiujn ĉi laborojn mi povis daŭrigi sole, sed kuŝas antaŭ mi grandega tasko kiun mi ne povas plenumi *sen via helpo*. Ekzemple, anstataŭ ol sendi *Elements of Esperanto* al mil redaktoroj, mi devas ĝin sendi al *dudek mil*. Sed tion fari, kunmetante leteron, elspezigus $700.00. Mi ne ĝin posedas. Kaj tiu ĉi estas nur unu malgranda afero, kaj la efektivaj bezonoj de la propagandado postulas ne malpli ol $100,000. Kiel komerca centro de Nord-Ameriko Chicago estas vere la loko el kiu elspezi tiun sumon. Nu, ni unue elspezu la unuan $1,000. Al miaj bonaj kunlaborantoj mi faras la jenan proponon: Nia lernolibro, *The American Esperanto Book*, oni vendas regule por $1.00, kaj la vendistoj ĝin aĉetas po 70 cendoj. Nu, al iu abonanto de *Amerika Esperantisto*, kiu sendos mandaton por $4.20, ni sendos afrankite *sep* ekzemplerojn de la libro. Jen bona metodo ekposedi unu el la libroj. Montru al via vendisto ke se li mendos ses, mandaton kun mendo, ni pagos la sendelspezojn. Tiam, por via laboro, la sepa apartenos al vi. Kiel metodo por disvastigi Esperanton, aĉetu ses aŭ dekdu da *American Esperanto Book* kaj ilin disdonu prunte inter viaj amikoj. Kelkaj entuziasmiĝos pri Esperanto kaj ĝoje pagos al vi dolaron por la libro.

Recenzante tiun ĉi libron por ĉiutaga ĵurnalo de Chicago, Dro. Fox, prezidanto de la Ĉikaga Esperantista Societo, diris:

> ". . . . a bulky volume of 316 pages, which certainly fills the great need of students, not only for the present, but for some time to come, for most assuredly it will be a long time before any other book will appear which can as efficiently do its work. . . . . The work throughout is a symbol of faithfulness, accuracy and devotion, such as only a man can create whose whole heart is in his subject, and who builds not alone for today, but for all time."

La *Saturday Evening Tribune*, de Seattle, kiu enhavas regulan fakon de Esperanto, diras:

> "It is one of the best things for English-speaking students that we have seen."

Portadu en via memoro ke *Amerika Esperantisto* estas

nur maŝino por la propagando de Esperanto. Ĝia vaporo devenas nur per brulado de mono. Hejtu do, hejtu! La redaktoro provizos la akvon (laŭ la *New York Journal* li posedas belan lagon ĉe la kranio), vi do tial bruligu la fajron!

## ESPERANTA LIBRARO

Kiel ofte oni skribas: "Mi forte deziras librojn esperantajn. Kiel ilin posedi?" Kompreneble, oni ne povas kompreni kial tiu ĉi oficejo ilin ne vendas. Nekaŝe klarigi, ni ne posedas sufiĉe da kapitalo. Tamen, ni havas ideon, kaj por aliaj krom ni mem la ideo ofte anstataŭas la monon.

Jen ĝi estas: El la kaprompiganta aro da libroj, kaj libretoj, kaj broŝuroj, bonaj, malbonaj kaj mezmeritaj, ni elektas kelkaj kiel "semoj." En Eŭropo, la prezoj estas kvazaŭ speciale faritaj de la diablo por naski konfuzon. La eldonantoj evidante ĵetis ludkubojn, ilin fiksante je 10, 1-1, 1-7, 1-11, 2-9, k. t. p. senfine. La plej malkarajn ni tute rifuzas tuŝi, kaj aranĝas nian propran prezaron jene:

### Klaso A—Unu Dolaro

*Hamlet*, el Shakespeare, de Zamenhof. *Esperantaj Prozaĵoj*, de kelkaj aŭtoroj. *Eneido*, el Virgil, de Valliene. (*Notu:* Kiam ia libro estas eldonata laŭ du manieroj, ni anoncas nur la pli bonan).

### Klaso A-B—Unu, 75 Cendoj

*Kondukanto kaj Antologio*, de A. Grabowski. *La Ventego*, el Shakespeare, de A. Motteau. *Ŝi Kliniĝas por Venki*, el Goldsmith, de A. Motteau.

### Klaso B—Du por Unu Dolaro.

*Julio Cezaro*, el Shakespeare, de D. H. Lambert. *Elektitaj Fabeloj*, el Fratoj Grimm, de Kabe. *Don Juan*, el Moliere, de E. Boirac. *Wilhelm Tell*, el Schiller, de L. E. Meier. *Paŭlo kaj Virginio*, tradukita de H. Hodler. *Christmas Carol*, el Dickens, de Dr. Martyn-Westcott. *Internacia Krestomatio*, de Kabe.

### Klaso C—Tri por Unu Dolaro

*Sep Rakontoj*. *Du Rakontoj*, de D. de Rothan. *Rakontoj pri Feinoj*, el D. Perrault, de Sino. Sarpy. *Blinda*

*Rozo*, el Hendrik Conscience, de Sino. Van Melckebeke Van Hove.

**Klaso D—kvar por Unu Dolaro**

*La Fundo de l' Mizero*, el V. Sieroŝevski, de Kabe. *L' Avarulo*, el Moliere, de Sam Meyer. *Perdita kaj Retrovita*, de E. Boirac. *Vojaĝo Interne de Mia Ĉambro*, el X. Le Maistre, de Sam Meyer. *Elektitaj Fabloj*, el La Fontaine, de G. Valliant. *Majstro Jan Hus*, de J. F. Kuhn. *La Interrompita Kanto*, el Eliza Orzeszko, de Kabe. *La Predikanto* (Ecclesiastes), de Zamenhof. *Horacio*, el Macaulay, de C. Bicknell. **Rip Van Vinkl**, el Washington Irving, de anonima tradukinto.

**Pakaĵo da Esperantaj Revuoj, Unu Dolaro**

Ni estas aranĝintaj dudek pakaĵojn da revuoj, dekdu numeroj en ĉiu. Neniu pakaĵo enhavas pli multe ol dn kajeroj de iu revuo, kaj multaj enhavas po unu ekzemplero de dekdu revuoj. Ni ne elektos—la supra pakaĵo aparteos al la unua mendanto.

La revuojn ni tuj poŝtigos. La librojn ni mendos por vi ĉe la eŭropaj eldonistoj. Ni ne akceptos mendojn por malpli ol unu dolaro. **Ĉe iu tempo ne pli multe ol unu monato post la ricevo, la aĉetinto povas resendi sian aĉetaĵon. Se bonstata, ni ĝin akceptos po tri kvaronoj de la originala prezo, se per la sama poŝto li sendas novan mendon akompanatan de markoj aŭ mandato por la alia kvarono.** En la plenumo de tiaj mendoj ni kompreneble sendos simile uzitajn librojn.

Nu, ni atendas vian mendon!

## *LA PARTIGO DE LA TERO*

El la germana de Schiller, tradukis H. Boucon, por **La Revuo.**

*Vi prenu la mondon! ekkriis al homoj*
*De sia ĉielo jen Zeŭso potenca;*
*Ĝin prenu, ĝi estos la via.*
*Al vi mi donacas ĝin kiel heredon*
*Kaj kiel feŭdecan eternan bienon;*
*Sed frate ja vi ĝin dividu!*

*Nun tial alkuras la tuta homaro,*
*Kaj ĉiuj, grandaĝaj aŭ junaj, rapidas*
*Ekpreni la parton konvenan.*

*Elektis plugisto la fruktojn de l' tero;*
*L' arbaron preferis la juna nobelo*
*Por ĝui la ĉason agrablan.*

*Plenigis vendisto la sian grenejon;*
*L' abato tre ŝatis la vinon malnovan,*
*Kaj li ĝin do por si rezervis;*
*La reĝo memvole dekretis impostojn*
*En lando ĉe pontoj kaj stratoj, dirante:*
*"Dekono al mi apartenos."*

*Jam estis entute la mondo donita*
*Kaj jen la poeto malfrue aperis;*
*Li venis el tre malproksime.*
*Ha Dio! Nenion plu vidi li povis,*
*Nun ĉiuj aliaj posedis la teron*
*Kaj havis la parton la sian.*

*Ve al mi! li diris; el ĉiuj mi sola*
*De vi, plejpotenca, nenion ricevis,*
*Mi, via plej bona naskito!*
*Jen laŭte li ĝemis kaj plendis al Zeŭso,*
*Kaj antaŭ la tronon de l' Dio kompata*
*Li nun ekplorante sin ĵetis.*

*Se vi en la lando de l' sonĝoj restadis,*
*Respondis la Dio, vi min ne riproĉu;*
*Pri tio ne kulpa mi estas.*
*Nu, kie vi estis dum oni partigis*
*La mondon? La dia poeto rediris:*
*"Kun vi en Olimpo mi estis."*

*Mi kion do faros? aldiris jen Zeŭso;*
*Ĉar ĉion mi donis, arbaron kaj kampojn,*
*Mi tute nenion plu havas.*
*Sed kun mi estonte se vivi vi volas,*
*En mian ĉielon vi rajtos alveni,*
*Mi tie vin ĉiam akceptos.*

## EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

**Mi Aŭdas Vin.**—Poezio de Leon Zamenhof, kun tre ĉarma muziko de Herbert Harris. Solo, *d* al *d* aŭ *f*. La prezo estas 35 cendoj. *American Esperanto Association, Boston.*

**La Espero.**—Nia esperanta himno, de L. Zamenhof, kun muziko de Woldemar Zaks. Por aŭ alta aŭ meza voĉo kun fortepiano, 1 marko; por viroĥoro, M. .40; por aparta kantvoĉo, M. .20. *Karl Rothe, Koenigstr. 6, Leipzig.*

**Esperanta Frazlibro de l' Turisto.**—Libreto montranta kolekton da frazoj utilaj por turisto, kaj presitaj en lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj Esperanto. Eldonaĵo de *Presa Esperantista Societe, 33 rue Lacepede, Paris.*

**La Esperanta Instruisto.**—Tiu ĉi nova gazeto venas el Anglujo, kaj la titolo montras la celon. Ĝi enhavas dekdu paĝojn, kaj la jara abono por nia lando kostas 50 cendojn. Eldonanto, *Guilbert Pitman, 85 Fleet Street, London, E. C.*

**Pri la Elparolado de la Vokaloj en Esperanto.**—En tiu ĉi broŝuro Sro. E. Ĉefeĉ pritraktas la nuancigon de la vokalsonoj de Esperanto. Tiel forte li interesis pri la temo ke li ellasis el la libreto la adreson de la eldonanto. La prezo estas 10 cendoj, kaj sendube oni povus ĝin aĉeti ĉe la internacia propagandejo.

**Taschenworterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch.**—Poŝlibro por germanlingvaj esperantistoj, redaktata de Dro. L. L. Zamenhof. Papera kovrilo, 137 paĝoj. Unu germana marko. *Moller & Borel, 95 Prinzenstrasse, Berlin.*

**Esperanto Manuel.**—Libro de 140 paĝoj, verkita de Gabriel Chavet kaj Georges Warnier. Celas praktikan kurson de dekkvin lecionoj por franclingvuloj. Estas tre utila por lerta esperantisto, ĉu komprenanta francan lingvon aŭ ne. Ricevebla de la eldonistoj, *Librairie de l'Esperanto, 46 rue St. Anne, Paris, II^e^.* Prezo, Fr. 1.00.

**Esperanta-Germana Frazlibro de la Ĉiutaga Vivo.**—Aranĝita de Sro. J. Borel, administranto de *Germana Esperantisto.* Kvindek ok paĝoj da interparoladoj en kolonoj paralelaj, germana kaj esperanta. Tre havinda por iu esperantisto. Prezo, marko .50. *Moller & Borel, 95 Prinzenstrasse, Berlin.*

**La Universala Ŝlosilaro.**—La Internacia Propagandejo, Merton Abbey, London, S. W., eldonas sub tiu titolon ses el la jam aperintaj "ŝlosiloj" kunmetitaj en luksa bindaĵo.

Rememorante, sendube, la diron de la fama angla poeto, ke "ĉiun pordon oro baras, orŝlosilo nur malfermas," ili orumas ambaŭ la stampaĵon kaj randojn de la libreto. La prezon estas profunda sekreto—almenaŭ nenio ĝin klarigas al ni. La Propagandejo ankaŭ estas eldonintaj novajn ŝlosilojn—por la hungaroj, portugaloj kaj braziloj.

**Himno.**—Kanto Esperantista de A. Dombrovski, kun muziko de Josee Guivy. Majesta himno de 11 strofoj, el kiuj ni represas la unuan:

> El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj
> Ni kunvenintaj Vin adoras, Di'!
> Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,
> Kaj nia kanto sonas nur al Vi.

La prezo de tiu ĉi muzikaĵo estas Fr. 1.25. Aĉetebla ĉe la eldonantoj, *Presa Esperantista Societo.*

**Laboro.**—Tia estas la nomo de nova monata ĵurnalo, organo de la Tutmonda Labora Societo. Al siaj korespondantoj *Laboro* diras: "Ni kun plezuro akceptas artikolojn de ĉiuj bonvolaj korespondantoj; sed nepre kaj senkompate ni malakceptos ĉiujn artikolojn tro revoluciemajn aŭ politikemajn. Nur por artikoloj, studoj, dokumentoj rilataj al la profesiaj interesoj kaj verkitaj de laboristoj estas difinita nia gazeto." La abonprezo estas 3 frankoj jare. Oni sin turnu al *Sro. Paul Blaise, 4, rue Bourg-Tibourg, Paris, IV.*

**Rip Van Vinkl.**—El la angla de Washington Irving, konata amerika aŭtoro, ĵus aperis tiu ĉi verko, tradukita de anonima esperantisto. Ĉar estas la modo ke ĉiu esperantisto eltrovu kaj anoncu la polvereton en la okulo de alia, ni ne povas ŝpari la rimarkon ke la dirita verko estas iomete tro laŭlitera. Tamen, estas pli facile kritiki ol plibonigi, kaj oni esperas ke ĉiu amerika esperantisto rapidos ekposedi tiun ĉi, la unua literatura presaĵo el Ameriko. Ĝi enhavas 36 paĝojn, estas bone presita sur taŭga papero, kaj broŝure bindita. Prezo afrankite, 25 cendoj. *A. L. Ellis & Company, 816 Randolph St., Oak Park, Ill., U.S.A.*

## INTERNACIA MONA SISTEMO

Antaŭ nelonge, en *Internacia Scienca Revuo*, Sro. Rene de Saussure proponis internacia monsistemo, kies unuo de valoro estas mil "spesoj"[a] aŭ spesmilo. La spesmilo, kun ĝia centona parto, la spesdeko, havas nur teorian ekziston, kaj ĝia celo estas anstataŭi la frankon kiel unuo de kalkulado inter esperantistoj, kaj eble aliaj. Unu dolaro


[a]Oni rimarku la vere esperantan harmonion inter *spezo* kaj *speso.*

egalas 2.05 spesmiloj. La vera internacieco de la spesmilo sin montras per la fakto ke neniu lando havas moneron de egala valoro, krom Peruo. La vera esperantisteco de la spesmilo ne estas dubebla, ĉar ĝi ekzistas en la imago sed ne en la poŝo. Jen la komparaj valoroj:

Franko Franca, Svisa, k. t. p., Sm. .40; Liro Itala, Sm. .40; Peseto Hispana, .40; Drakmo Greka, .40; Lejo Rumana, .40; Dinaro Serba, .40; Levo Bulgara, .40; Bolivaro Venezuela, .40; Krono Aŭstria, .415; Ŝilingo Angla, .50; Marko Germana, 49; Rublo Rusa, 1.05; Krono Skandinava, .55; Floreno Holanda, .825; Milrejso Portugala, 2.22; Milrejso Brazila, 1.12; Peso Arĝentina, 2.00; Peso Ĉilia, 1.50; Peso Meksika, 2.02; Piastro Egipta, .10; Piastro Turka, .09; Taelo arĝenta, Ĥina, 3.25; Rupio Hinda, .97; Jeno Japana, 1.02; Tomano Persa, 3.53; Suno Perua, 1.00.

Sed al amerikano sufiĉas ordinare ke li memoru ke unu spesmilo (Sm.) valoras proksimume 50 cendoj, kaj unu spesdeko (Sd.) ĉirkaŭ duono da cendo.

---




Of course all the new converts are pleased, but the approval of the old esperantists is the better criterion. Some of these are able to suggest improvements, but all agree that *The American Esperanto Book* is by far the student's best friend. One university student even says it is the best text-book he ever saw. But that's not important. Just remember that it's the best in the Esperanto field, and that a few cents more in cost is amply repaid in time saved, brain-wear saved, eye-power saved (long primer type, leaded and double-leaded). The vocabularies (130 pages) have all the Esperanto roots of the Esperanto-German dictionary, the most complete, edited personally by Dr. Zamenhof. Contains the full *Ekzercaro* of 42 sections, by Zamenhof. Cloth, 316 pp., side and back gold stamp. Recommend it to everybody, and buy it for yourself and friends. Single copy, $1.00; six copies, $4.20.

*AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO*
*1239 Michigan Boulevard, Chicago*

## "CONSTITUTION AND BY-LAWS" OF THE "AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION"

1. The name of this Association shall be the American Esperanto Association.

2. It exists for the purpose of promoting the use of Esperanto, the auxiliary international language.

3. Its principal objects are: to furnish information; to unite Esperantists, both individuals and local societies; and to publish the "American Esperanto Journal."

4. Membership in the Association costs individuals $1.50 a year; societies, $2.00. These fees include a year's subscription to the Journal.

5. The Association shall be managed by a Council, which shall be composed as follows:—President, Treasurer, Secretary, four General Councilors, four Delegate Councilors, and not more than three Special Councilors,—the last-named to be chosen by the holders of certificates of proficiency (Kapableco) from any recognized National Association.

6. The four District Councilors shall be respectively nominated and chosen by the members of the Association resident in the four Sections of the United States,—the East, the Central States, the South, and West,—the exact limits of which shall be determined by the Council.

7. The President and the four General Councilors shall be chosen by the members of the Association at large. The General Councilors shall be chosen for a term of two years, two being chosen each year. Officers and other councilors shall be chosen for one year.

8. The Treasurer and the Secretary shall be chosen by the Council.

9. The Elections for Members of the Council other than Treasurer and Secretary shall take place annually in December. Nominations must be signed by at least five Members of the Association, and must reach the Secretary before November 1st. The names of all such nominees shall appear in the December number of the Journal.

10. The Members of the Council shall hold office from January 1st until the selection of their successors.

11. The Council shall select in January an Executive Committee of not more than three Councilors. This Committee shall have all the powers of the Council, subject to the immediate recall of such powers by the Council.

12. The Executive Committee shall select in January the Chief Editor of the Journal, who also shall be approved by the Special Councilors, and who shall hold office at the pleasure of the Council.

13. The Council shall also appoint in January a Secretary of the Council, who shall hold office at the pleasure of

the Council. It shall be the duty of this Secretary to keep the Records of the Couucil and to send all official announcements to the Members of the Council.

14. The Council shall have power to make rules for the conduct of its business; but all measures requiring a formal vote shall be introduced either by the Executive Committee or by three other Councilors. The Executive Committee shall always have the right to comment upon any proposition submitted.

15. The Council shall have power to appoint to all vacancies which may occur in it, which appointments shall terminate at the succeeding annual election.

16. Amendments to this Constitution and By-Laws can be proposed upon a written request, signed by at least twenty members of the Association, or by a majority of the Council. All such amendments must appear in two successive numbers of the Journal, and must be carried by two-thirds vote of those voting. All votes upon such proposition must be received by the Secretary of the Council not later than four weeks after the second appearance of the proposition in the Journal.

## And Some Remarks

The foregoing constitution and by-laws, so-called, of the American Esperanto Association, so-called, were published in the Journal for July. According to the printed matter of this Association, it was founded in 1905. Were the members associated according to any recorded agreement previous to the incubation of this constitution? If so, where is that agreement, where was it during those two years, and what killed it? Last year the Association had several hundred paying members and a few dozen assorted vice-presidents. This year it has shed the vice-presidents, acquired a fine set of new offices which as yet are vacant, a constitution and a pair of by-laws.

By whose benevolence? What kind-hearted gentleman, his sympathies stirred by the by-lawless condition of our Association, telephones the department store to send over a pair of ready-made side-opening by-laws about the right size for a two-year-old Association?

This time last year, the Association possessed the following officers: President, R. H. Geoghegan; vice-presidents, Grillon of Philadelphia, Talmey of New York, and Morin of Chicago, if no more; secretary, Twombley of Boston; treasurer, Travis of Brooklyn.

Of these gentlemen, all of whom are living, two, Sroj. Travis and Twombley, retain their offices. Prof. Grillon,

who is the head of the Philadelphia movement, either resigned or was discharged. Mr. Morin, then president of the Chicago Esperanto Society, was eliminated, and Mr. Geoghegan, one of the oldest English-speaking Esperantists, lost his job.

There was no petty formality such as an election. The expense and uncertainty of these ceremonies is rendered unnecessary by a form of parliamentary procedure which is captivating in its simplicity. Mr. John Fogg Twombley, a talented Bostonian, calls himself together in a special session. We reprint the minutes of one of these meetings:

> "The American Esperanto Association held a special meeting last Saturday night. All active members were present and business was good. On motion of Mr. Twombley, it was decided that we would need a president, as they are said to be quite stylish this year; the chair appoints a nice one. Mr. Fogg suggested vice-presidents, and on advice of Mr. John, who demonstrated that they are cheaper in quantities, a crate of soft-shelled ones was ordered. A motion to purchase a small pair of by-laws was rejected after discussion, it being the majority opinion that the Association is as yet too young to wear them. Motion to to grant the Association a toy constitution with a rubber teething ring attached precipitated a heated debate between Sroj. Twombley and Fogg. The Chair, unable to restore order, adjourned the meeting.

As an Esperantist and a private citizen, the affairs of any association are not mine. A few perfect gentlemen may meet in Boston and constitute themselves, on paper, the Sapient Sahibs of Sunrise for aught we care out west. But when, overawing us verdant come-ons from the tall, rank grass with their imposing stationery, they lead us to believe that they are a duly organized and representative body; if then, without the shadow of formal procedure they depose from alleged office three of the leading Esperantists of the country, abolish certain offices and create others, filling them by *appointment* without consulting the membership; if then, over a year after the inception of the supposed organization, and after several hundred individuals have "joined" them, they publish an alleged constitution, not as a *proposed* law for the referendum of the rank and file, but as *the* law, to be amended only by a two-thirds majority vote; when these things occur, I think them well worthy of mention.

The American Esperanto Association does not exist. It has never existed except in the imaginations of certain people who did not know the facts, and in the good-natured tolerance of others who did.

It is not the desire of this magazine to detract a single spesmilionono from the excellent propaganda work accom-

plished by Mr. Twombley and his worthy *American Esperanto Journal.* Equally with the *North American Review, The Christian Endeavor World, Appeal to Reason, Chicago Daily Socialist*; equally with Prof. Grillon of Philadelphia, Geoghegan of Alaska, Randall and Adams of Seattle; perhaps more than any of these, Sro. Twombley is entitled to the grateful respect of the Esperantists of America for his enthusiastic, effective labor and generous self-sacrifice. But in order to make the "Association" fairly representative of the American movement as a whole their co-operation might not be a bad thing to have about the house, and they could possibly sew a few much-needed buttons on those by-laws. A little fuller detail as to the manner of voting and counting ballots, of receiving money, authorizing and accounting for expenditures, etc., might be added, though the versatile performances of our Boston friends throws doubt upon the necessity of it. However, there are 1400 Esperantists with the *Review*; 1500 more from the *Appeal,* 1050 Christian Endeavorers; a few hundred from the *Daily Socialist;* several hundred more scattered about Philadelphia and Seattle, not to mention a dozen or so who are either readers of this forlorn journalistic hope or have promised to subscribe as soon as their hens begin to lay. And let me say right here that those Endeavorers and Socialists know what propaganda work ought to look like.

Instead of being simply a rear annex of the Boston society, as inorganic as a young comet's tail, the society which assumes to represent the American movement should be an organic, compact body of 5,000 members. It should not condescendingly permit the affiliation of Esperanto clubs, but should actively strive to make every club in North America an organic, living part of itself. Anything short of this is a joke. To begin by disregarding great numbers of Esperantists and alienating others by a ridiculous assumption of authority may be diverting, but it is not Esperanto and is not propaganda.

The first duty which will devolve upon the "Council" elected under this regime will be, then, to take steps toward a real organization. The Esperanto clubs of America are entitled to proportionate representation. Let conventions be held in Toronto, Boston, New York, Philadelphia, Chicago, Seattle, Los Angeles, federating local groups. America is too large to be wagged all at once as the tail of the estimable, overestimated, dear, provincial Boston!